



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 8-a de Januaro 2018

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Ŝlomo Ŝaĥar, Asaf Ĥefec, Dror Gaon, Eran Vodevoz, Mikaelo Lineckij, Gabi Zeevi. **Gastoj:**, Lea, Joela

Protokolo de la antaŭa kunsido (4-a de decembro 2017) - sendita al la partoprenantoj. Estis en ĝi kelkaj eraroj – korektite!

1. Raportoj:

a) La Novjara Renkontiĝo en Saarbrücken (Amri). Ĉeestis ĉ. 200 homoj, elinter ili ĉ. 70 infanoj. Amri sukcesis vendi iom el niaj aĵoj, kaj prezentadis antaŭ la publiko. Kadre de sia prelego pri Akko li reklamis pri la Israelaj Kongresoj en 2018 kaj 2019, evidentiĝis interesiĝo de la partoprenantoj.

b) Membrec-nuligoj far d-ro Tsvi Sadan (Jehoŝua). Li sciigis, ke li ne intencas pagi plu al ELI. Ankaŭ ne la UEA-membrecon tra ni, li aranĝos individue (senrilate al UEA, li estas Akademiano). *Decido: Jehuda Miklaf devos interesiĝi, esplori lian staton, kaj informi nin – ĉu li venas al niaj kunvenoj, aŭ ne?*

2. Esperanto-kurso en Tel-Avivo - (Amri)

a) Por komenci la instruadon Doron petas reklamadon. Estas tri specoj: sur grandaj afiŝoj, en la gazetaro kaj rete. Ni havas 5000 NIS por la tuto. Malgraŭ pluraj petoj dum pli ol monato neniu volontulis por la du unuaj taskoj.

Nun estas trovitaj kunlaborantoj: Avigail akceptis preni la grandajn afiŝojn al kompanio, kiu surgluas ilin. Joela akceptis klopodi retrovi la kompanion kun kiu ŝi laboris antaŭ jaroj. Doron ŝanĝos la datojn de la kurso sur la afiŝoj. Joela esploros eblecojn senpage aŭ ne altkoste reklami en gazetoj. Amri faros la retan propagandon (per pagita Facebook-kampanjo).

b) Eran sukcese prezentis 3 prelegojn pri Esperanto al 7-a klaso en Givataim por interesiĝi gelernantojn pri E-o kadre de la “Sparkoj”= “fajreroj” - sukcesa programo en la 7-aj klasoj, ĝi enhavas 3 renkontiĝojn. Nun estas farata provo eki similan programon en Ganei Tikva kaj Modiin.

3. La 18-a IK en Akko 3-5 majo 2018 (Amri)

a) Ĉu grupa aŭ individua aliĝo ĉe la gastejo? Por la grupa – ni bezonas la liston de la partoprenantoj, kun datumoj, deziroj, ktp. Jael Ŝelaĥ akceptas resumi tian liston.

b) Aliĝilo – por ke Jael povu labori, Jehoŝua aktualigos la aliĝilon (ĝis 24.1), ni dissendas ĝin per ELI-listo, kaj Dror surmetas ĝin al la reto.

c) Ekskursoj dumkongresaj: Akko kaj la Bahaaj Ĝardenoj en Haifo. Marta Otto pretas gvidi nin, se ŝi ricevos permeson de siaj superuloj veni ĉi tien. Por Nazareto ni ne havos tempon dum la kongreso (ev-e unutage antaŭkongresan ekskurson al Nazareto kaj Lago de Galileo).

PK: 6 tagoj, inkluzive Jerusalemon, la Mortan Maron, Eilat kaj Petra.

2/...



4. Oficejo (Ŝlomo)

Nova propono (anstataŭ la lasta malgranda, 21 m²): 90 m², en la Domo de la Industriuloj, sur la 10-a etaĝo, por ĉ. 1.2 miliono da sikloj. Ebla enspezo kontraŭ luigo: 5000 sikloj monate. Estas unu parkejo por plua pago. *Decido: Ŝlomo interesiĝos, ĉu ili pretos vendi duonon, kaj ĉu en tiu kazo eblas dividi la spacon per gipsa muro.*

5. La Poŝtkesto de ELI (Dror)

Ni devus pagi por la nova loko dum la venontaj tagoj, sed estas problemo de aliro, ĉar oni povas aliri nur dum la laborhoroj, kiam la filio estas malfermita, kaj ne eblas ekstere. Dror tamen klopodos aranĝi la aferon. *Decido: ni pagos nur por unu jaro* (malgraŭ la rabato por du).

6. Israela E-isto: n-ro “vintro 2017” (Amri)

La materialo estas jam preta. Ĉu Mikaelo Lineckij povas esti la nova redaktoro? – Li akceptas! Por la venonta n-ro Amri laboros kun li paralele, montros la enpaĝigon kaj aliajn sciindaĵojn. Cetere, Mikaelo havas jam eldonajn spertojn en sia praktiko.

7. Taskoj de la estraranoj

Ĉiuj reelektitaj estraranoj restas ĉe siaj antaŭaj taskoj (*vidu <http://esperanto.org.il/estraro.html>*).

a) La nova estrarano, Mikaelo Lineckij, okupiĝos pri eldona agado. Eble li povus instrui E-on al ruslingvanoj, sed por tio necesus reklamado en la ruslingvaj amas-komunikiloj.

b) *Lea*: Kiuj estas en la nova kontrolkomisiono? *Jehoŝua*: Ŝaul Ĥasid kaj Jael Ŝelaĥ.

Lea: ni ne traktis, kion faris la kontrolkomisiono!

Joela: ĉiu elspezo devas esti kontraŭ kvitanco!

Amri kaj Jehoŝua: laŭ la leĝo ĉiu asocio devas havi kontrolkomisionon, sed ĝi ne estas devigita regule kunsidi. La buĝeto estas prilaborita kaj raportita de Ŝlomo, la kasisto; tio ne estas tasko de la kontrolkomisiono. Tamen, se la komisiono, aŭ unu el ĝiaj membroj, trovas ion malĝustan aŭ kontraŭleĝan, ili devas atentigi pri tio. Pri la kvitancoj: prave, ni ĉiam donas/ricevas kvitancojn por ĉiu en/elspezo, sed foje, pro la frua foriro de la kasisto, la kvitanco estas donita nur en ol venonta okazo.

8. Prokrastitaj eroj:

a) Ĉu ni serĉu novan klubojon? ,

b) La 20-a IK en Eilat – ĉu inviti ankaŭ la alian duonon de Kajto?

La venonta kunsido: la 5-a de Februaro, 2018

Protokolis: Gabi Zeevi